

Joseph Mohr,  
Stille Nacht, heilige  
Nacht

Joseph Mohr,  
Sankta nokto

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Joseph Mohr,  
Paca Nokt'!

*tradukita de Hans-Georg Kaiser*

Joseph Mohr,  
Sankta nokto

*tradukita de Richard Schulz*

*Übliche Version*

1. Stille Nacht, heilige Nacht!  
Alles schläft, einsam wacht  
nur das traute, hochheilige Paar.  
„Holder Knabe im lockigen Haar,  
schlaf in himmlischer Ruh',  
schlaf in himmlischer Ruh'!"

1. Sankta nokt' estas nun ja!  
Dormas jam ĉie la  
homoj krome de l' kara par'.  
"Kara knabo en bukla harar',  
dormu vi en la trankvil',  
dormu vi en la trankvil'!"

Argiope-informo:  
La aspekto de tiu ĉi versio estas barita.  
Supozeble la aŭtoro decidis tion.

Pacplena nokt', dormas la mond'!  
Sankta nokt', ĉie en rond'!  
Viglas sole la tre kara par'.  
Ĉarma knabo kun bukla harar',  
Dormu en Dia ripozo,  
Dormu en Dia ripoz'!

2. Stille Nacht, heilige Nacht!  
Gottes Sohn, o, wie lacht  
Lieb' aus deinem göttlichen Mund,  
da uns schlägt die rettende Stund',  
Christ, in deiner Geburt,  
Christ, in deiner Geburt.

2. Sankta nokt' estas nun ja!  
Fil' de Di', kiom da  
amo elradias el vi!  
Nun per vi ja saviĝis ni,  
Krist', pro via naskiĝ',  
Krist', pro via naskiĝ'.

Pacplena nokt'! Aŭdas paŝtist' ...  
Sankta nokt'! ... famon pri Krist'.  
De l' anĝel' haleluja la vok'  
Laute sonas tra ĉiu ajn lok':  
Venis por savi vin Kristo!  
Venis por savis vin Krist'!

3. Stille Nacht, heilige Nacht!  
Hirten erst kundgemacht.  
Durch der Engel Halleluja  
tönt es laut von fern und nah:  
"Christ, der Retter ist da,  
Christ, der Retter ist da."

3. Sankta nokt' estas nun ja!  
Savon nun ĝi al la  
mondo portis, vidigas ĝi  
la plenecon de l' graco al ni:  
Dion en homa figur',  
Dion en homa figur'.

Pacplena nokt'! Filo de Di'!  
Sankta nokt'! Jen la Mesi'!  
Amo ridas el via vizaĝ';  
Nia estas fervora omaĝ',  
Kristo, pro via naskiĝo,  
Kristo, pro via naskiĝ'.

...

...

...

...

4. Sankta nokt' estas nun ja!  
La potenc' nun de la  
patra amo verŝiĝas en Lin,  
grace, patre brakumas Li nin,  
la popolojn de l' mond',  
la popolojn de l' mond'.

5. Sankta nokt' estas nun ja!  
La Sinjor' jam en pra-  
temp' promesis, ne plu kun koler',  
al ni homoj sur tiu ĉi Ter'  
la pardonemon de Li,  
la pardonemon de Li.

6. Sankta nokt' estas nun ja!  
Sonas Haleluja'  
sur la Tero nun ĉie ĉi.  
Al paŝtistoj sciĝis ĝi:  
"La Savint' venis jen,  
la Savint' venis j44. 2.en."

...

...

...

...

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas JOSEPH MOHR (\*1792 – †1848), publikigita 1818-12-24.*

*MR-011-2 / Arg-94-190 (2014-12-24 17:49:55)*

*Die ursprüngliche Fassung des Liedes enthält sechs Sttopen. Die Melodie stammt von dem Organist Franz Xaver.*

*Traduko de la Germana poemo “Stille Nacht, heilige Nacht” de JOSEPH MOHR (\*1792 – †1848) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 2000-12.*

*Arg-94-191 (2006-04-27 13:10:54)*

*Traduko de la Germana poemo “Stille Nacht, heilige Nacht” de JOSEPH MOHR (\*1792 – †1848) en Esperanton de HANS-GEORG KAISER (Cezar, \*1954-05-21).*

*Arg-94-712 (2006-04-27 13:26:06)*

*Traduko de la Germana poemo “Stille Nacht, heilige Nacht” de JOSEPH MOHR (\*1792 – †1848) en Esperanton de RICHARD SCHULZ (Rikardo Ŝulco, \*1906-07-12 – †1997-09-26) en 1981-12.01.*

*Arg-94-1191 (2014-12-24 17:39:38)*

*Tiu ĉi traduko aperis 1981-12-01 en la “Vestfaliaj Flugfolioj”, kiujn eldonis la tradukinto Richard Schulz (Rikardo Shulco). Tie estis indikita ankaŭ la melodio de tiu mondvaŝte konata germana kristnaska kanto. Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Richard\\_Schulz](http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz).*